

*La Parabolo de l' Herboj*  
*La 5-a Ĉapitro de Saddharmapundarika-Sutra*  
*aŭ Sankta Skribo Lotusfloro de l' Mirinda Leĝo*

妙法蓮華經藥草喻品第五

trad. **Kiuiĉi Nohara**, Japanio

(tradukita el la sanskrita originalo kaj komparita kun ĉinlingva traduko)

Tiam la Sinjorego<sup>1</sup> alparolis al la honorinda Granda Kaŝjapa<sup>2</sup>, kaj diris: Tre bone, tre bone, ho Kaŝjapa, vi ja tre bone proklamis la verajn ecojn de l' Tathagato<sup>3</sup>. Tio estas la veraj ecoj de l' Tathagato, ho Kaŝjapa, sed li havas, krom tio, da ecoj multege, sennombre, nekalkuleble, tiel ke oni ne povus nombri en la daŭro de nemezureblaj Kalpoj<sup>4</sup>. La Tathagato estas mastro, ho Kaŝjapa, reĝo, sinjoro, mastro de ĉiuj leĝoj. Kaj kiu ajn leĝo, kia ajn okaze farata de l' Tathagato, restas neŝanĝebla<sup>[tiel!]</sup>. Ĉiuj leĝoj, ho Kaŝjapa, estas bone farita de l' Tathagato. Per sia Tathagata saĝo, li faris ĉiujn leĝojn, tiel ke ĉi tiuj en la fino alkondku al la rango de ĉioscio. La Tathagato ankaŭ bone konas la ideon de ĉiuj leĝoj. La Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto<sup>5</sup> havas la scipovon penetri ĉiujn leĝojn; havas la plej altgradan perfektan scion; scipovas decidi la leĝojn, elmontri la scion de l' ĉioscianto, disdoni la scion de l' ĉioscianto.

Tio similas al la granda pluvonubo, pendanta super la granda tero, super medikamentherboj, arbetoj, arboj de ĉiuj specoj, kun ĉiuj nomoj, kreskantaj sur la

---

<sup>1</sup> Bhagavat: titolo de Budho. En ĉinlingva traduko, ĉi tiu vorto estas jen transliterita per 薄伽梵, jen tradukita per la sama vorto Ŝih-Cun (japane: Seson)世尊, kun alia titolo <Lokanatha>, kiu signifas la plej honoran aŭ sinjorego de l' mondo; kaj ĉi tiu vorto estas jam de longe alku-timita al la oreloj de l' orientazianoj. Mi opinias ke <Sinjorego> estas preferinda ol <beatulo>, kvankam ĉi tiu konformas al la angla lingvo <blessed> per kiu Max Müller tradukis la saman vorton - La tradukinto.

<sup>2</sup> Unu el la disĉiploj de Budho. 摩訶迦葉

<sup>3</sup> Unu el <la dek titoloj> de Budho.

<sup>4</sup> Jarbiliono proksimume. 劫波, 劫.

<sup>5</sup> Tra la tuta volumo de la Saddharmapundarika, la vorto <Tathagato> estas preskaŭ ĉiuokaze sekvata de procesio da titoloj samtempe donitaj al Budho, t.e. tiel nomataj <la dek titoloj>. En ĉi tiu traduko, tamen, mi simpligis ĝin, kaj konservis nur la unuan trion, esceptinte nur unu lokon.

tero, sur la monteto, sur la monto - la pluvonubo, kiu elverŝas pluvon sur la tero, ĉie samtempe. Tiam, ho Kaŝjapa, la medikamentherboj, arbetoj, arboj sur la tero, kun malgrandaj radikoj, malgrandaj trunkoj, malgrandaj branĉoj, malgrandaj folioj; kun mezgrandaj radikoj, mezgrandaj trunkoj, mezgrandaj branĉoj, mezgrandaj folioj; grandaj radikoj, grandaj trunkoj, grandaj branĉoj, grandaj folioj, - ĉiuj vegetaĵoj grandaj, mezgrandaj, kaj malgrandaj, ensorbadas, ĉiu laŭ sia kapablo, la malsekan elementon el la ekvo elverŝita de l' granda nubo, kaj per la akvo abundege donata de la nubo, ili ricevas, ĉiu laŭ sia speco, propran formon, atingas la naturan grandecon, floradas en sia tempo, kaj donas fruktojn kun nomo laŭspece donita. Ĉi tiuj diversaj vegetaĵoj, kiuj havas siajn radikojn en la sama tero, ensorbadas akvon kun unu sama esenco.

Sammaniere, ho Kaŝjapa, la Tathagato-Arhat-Plenvekiĝinto aperas en la mondo. Simile al la granda nubo, aperinta en la aero, aperas la Tathagato, kaj vokadas laŭtvoĉe tra la tuta mondo, kun dioj<sup>6</sup>, homoj, kaj Asuroj<sup>7</sup>, kaj kiel la granda nubo, ho Kaŝjapa, kovradas la tutan firmamenton, tiel simile, ho Kaŝjapa, la Tathagato-Arhat-Plenvekiĝinto, antaŭvizaĝe de la mondo kun dioj, homoj kaj Asuroj, laŭtvoĉe vokadas kun jenaj vortoj: - Mi estas, ho vi dioj kaj homoj, Tathagato, Arhat, Plenvekiĝinto, Sufiĉeposedanto de Scienco kaj Konduto, Sugato, Scianto de l' Mondo. La Plej Supra, Homdisciplinisto, Instruisto de Dioj kaj Homoj, Budho-Sinjorego<sup>8</sup>. Mi estas jam atinginta la alibordon, kaj tial mi kondukas tien tiujn, kiuj ne ankoraŭ atingis ĝin; mi estas jam liberiĝinta, kaj tial mi liberigas tiujn, kiuj ne estas ankoraŭ liberiĝintaj; mi estas jam trankvila, kaj tial mi trankviligas tiujn, kiuj ne estas ankoraŭ krankviliĝintaj; mi jam akiris la Nirvanon, kaj tial mi akirigas la Nirvanon al tiuj, kiuj ne ankoraŭ ĝin akiris. Per mia perfekta saĝo, mi scias ambaŭ mondojn - ĉi tiun, kaj la venontan, tia kia ili estas. Mi estas ĉioscianto, ĉiovidanto. Venu al mi, ho vi dioj kaj homoj, kaj aŭskultu la leĝon. Mi estas gvidanto, kaj montras la vojon, ĉar mi scias, bone konas la vojon.

Tiam venas, ho Kaŝjapa, sennombraj centmil miriaroj da dekmilionoj da vivantoj, por aŭdi de l' Tathagato la leĝon; kaj la Tathagato, ĉar li scias bone kaj ĉiuj vivantoj estas malsamaj en kapablo kaj forto, instruas la leĝon diversmaniere, por ke

<sup>6</sup> <Deva> estaĵo iomete plisupera ol la homo. 天

<sup>7</sup> Demona estaĵo. 阿修羅

<sup>8</sup> Jen la dek titoloj: 1. tathāgata (kiu iradas laŭ la vero mem)如来; 2. arhat (kiu meritas ricevi oferaĵon)应供,阿羅漢; 3. samyak-saṃbuddha (plenvekiĝinto)正遍知,等正覺; 4. vidyācaraṇa-saṃpanna (sufiĉeposedanto de scienco kaj konduto)明行足; 5. Sugata (kiu bone alvenis al la alibrodo)善逝; 6. loka-vid (scianto de l' mondo)世間解; 7. anuttara (senplisupra, plej supra)無上士; 8. puruṣa-damya-sārathi (homdisciplinisto)調御丈夫; 9. śāstā-deva-manuṣyāṇām (instruisto de dioj kaj homoj)天人師; 10. buddho-bhagavān (Budho kaj monda sinjoro)仏世尊.

[En tiu ĉi komentario kaj en aliaj lokoj la tradukinto Nohara konfuziĝas transliterumante sanskritajn vortojn, ĉar li uzas Esperantajn kaj sanskritajn diakritajn signojn mikse, kiel ekzemple "vidjā-ĉarṇa" anstataŭ "vidyācaraṇa". Mi korektis ilin ĉiujn aŭ simple forigis sanskritajn originojn ne tre necesajn laŭ mia juĝo. - de Yamaguti S.]

ĉiu kun ĝojo kaj plezuro, ricevu bonan efikon. Ĉiuj vivantoj, aŭdinte la leĝon, ne nur vivadas pace en ĉi tiu mondo, sed ankaŭ postmorte renaskiĝos en la feliĉa mondo, kie ili povos ĝui multajn plezuraĵojn, kaj aŭdi la leĝon. Aŭskultinte la leĝon, ili povas liberiĝi el ĉiuj malhelpaĵoj, kaj ĉiu, laŭ siaj kapablo, forto, kaj povo, okupiĝos je l' leĝo, de l' ĉioscianto, kaj eniros iom post iom en la vojon.

Kiel la granda nuboj, ho Kaŝjapa, kiu kovradas la tutan firmamenton, elverŝante la saman akvon, vivigas ĉiujn herbojn, arbetojn kaj arbojn; kiel la herboj, arbetoj kaj arboj, laŭ siaj kapablo, forto, kaj povo, ensorbas la akvon kaj per tio, plene kreskadas, kaj disvolvas la econ propran al sia speco, tiel same, ho Kaŝjapa, la leĝo instruata de l' Tathagato-Arhat-Plenvekiĝinto, estas en unu sama esenco, t.e. liberiĝo, foriĝo de pasio, kies fina celo estas plena estingiĝo, la scio de l' ĉioscianto. Sed, ho Kaŝjapa, la vivantoj, kiuj aŭdas la leĝon instruatan de l' Tathagato, aŭ kiuj memoras kaj praktikas ĝin, ne scias, nek perceptas, nek komprenas sin mem. Scias, ho Kaŝjapa, nur la Tathagato, kiuj, kiaj, kiaklasaj estas tiuj vivantoj; kiom, kiel, per kio ili pensadas; kion, kiel, per kio ili konsideras; kion, kiel, per kio ili praktikadas. Nur la Tathagato klare vidas ĉion, kiel ĝi vere estas, kaj vidas, ke la vivantoj estas en diversaj gradoj, kiel herboj, arbetoj, kaj arboj, superaj, mezaj, kaj malsuperaj. Mi scias, ho Kaŝjapa, ke la leĝo estas en unu sama esenco, t.e. esenco de liberiĝo, forigo de pasio, aŭ plena estingiĝo, kiel fina celo estas la Nirvano, kaj rezultas en vakuismon<sup>9</sup>; sed mi ne elmontras subite la scion de ĉioscianto al ĉiuj; ĉar mi konsideras la ecojn de ĉiuj vivantoj.

Vi miros, ho Kaŝjapa, ke estas malmultaj homoj, kiuj povas kompreni kaj akcepti la doktrinon eksplikatan de l' Tathagato. Efektive, ho Kaŝjapa, la doktrino eksplikata de ĉiuj Tathagatoj-Arhat-Plenvekiĝintoj estas malfacile komprenebla.

Tiam, por ekspliki la saman aferon pliklare, la Sinjorego donis jenajn versaĵojn: -

1. Mi estas Dharmaraĝo (reĝo de l' leĝo), aperinta en la mondo, kiel detruisto de l' ekzistado<sup>10</sup>. Mi deklaras la leĝon al ĉiuj vivantoj laŭ iliaj diversaj ecoj.
2. Superaj personoj kun profunda saĝo, longe silentas, kaj ne faile elmontras la misteron al vivantoj.
3. La instruaĵo ne estas facile komprenebla; aŭdinte ĝin subite, la sensaĝuloj konfuziĝas, kaj pro sia senscio, ili perdas la vojon, kaj flanken erariras.
4. Mi parolas al ĉiu laŭ liaj kapablo kaj forto; per diversaj esprimoj, mi igas ĉiun ricevi ĝustan vidon.
5. Tio similas, ho Kaŝjapa, al la nuboj kiu de la horizonto suprenvenas, kaj plenigas la tutan spacon, kaj kovras la teron.
6. La grandega pluvonubo, riĉa kun akvo, ekipata per fulmo, vekas ĉiujn vivantojn per la tondra vokado.
7. Ĝi skrenas<sup>[tiel!]</sup> la sunradion, malvarmetigas la teron; iom post iom ĝi venas malsupren, proksimen, ekverŝas akvon, ĉien, ĉirkaŭen.

---

<sup>9</sup> śūnyatā, 空

<sup>10</sup> 破有法王

8. Tiele, ellasante fulmon ĉiuflanken, ĝi elverŝas abunde da akvo ĉie egale, kaj refreŝigas la teron.
9. Ĉiuj vegetaĵoj, medikamentherboj, elkreskintaj sur la tero, arbetoj, kaj arboj en arbaro, grandaj, malgrandaj,
10. Diversaj grenoj en la kampo, legomoj, ĉiuj vegetaĵoj sur monteto, en valo, kaj en densejo,
11. Ĉiuj ĉi herboj, arbetoj, kaj arboj reviviĝas per la nubo kiu refreŝigas la soifantan teron, kaj akvumas la medikamentherbojn.
12. La nubo disdonas akvon kun unu sama esenco; herboj kaj arboj ĝin ensorbis ĉiu laŭ siaj kapablo kaj forto.
13. Ĉiuj arboj, grandaj, mezgrandaj, kaj malgrandaj, trinkas la akvon laŭ sia kresko kaj forto, kaj bone kreskadas.
14. La grandaj arboj, kies trunkoj, radikoj, ŝeloj, lignoj, branĉoj, kaj folioj estas malsekiĝitaj de l' akvo el la nubo, disvolvas florojn kaj donadas fruktojn.
15. La fruktoj donataj estas malsamaj laŭ la kapablo, forto, kaj eco de l' speco; sed la akvo estas en unu sama esenco.
16. Sammaniere, ho Kaŝjapa, Budho venas en la mondon kvazaŭ pluvonubo. Naskiĝinte en la mondo, li, Sinjorego de l' mondo, parolas kaj elmontras veran vojon de l' vivo.
17. La Sanktegulo honorata en la mondo kun dioj kaj homoj, parolas jene: Mi estas Tathagato la plej supra el la homoj, la venkinto<sup>11</sup>; mi aperis en la mondo kvazaŭ nubo.
18. Mi refreŝigas iujn vivantojn, kies korpoj estas elvelkintaj, kaj kiuj estas enkatenigitaj en la tri mondoj<sup>12</sup>. Mi liberigas ilin el la suferado, kaj igas ilin ricevi feliĉecon en la mondo, kaj feliĉecon de Nirvano.
19. Aŭskultu al mi, ho vi dioj kaj homoj, alproksimiĝu, kaj ridardu min. Mi estas Tathagato, Sinjorego, la plej supra, aperinta en la mondo por savi ĉiujn vivantojn.
20. Al miloj da dekmilionoj da vivantoj, mi predikas la feliĉigan, puran leĝon, kiu celas nur unu aferon, t.e. liberiĝo kaj Nirvano.
21. Mi predikadas ĉiam en la sama voĉo, prenante vekigon kiel temon, kiu estas egala por ĉiuj; en ĝi estas neniu partio, neniu amo, neniu malamo.
22. Mi ne havas afekcion, nek amon, nek malamon; mi proklamas la leĝon al ĉiuj sendiference; al unuj same kiel al la aliaj.
23. Mi okupiĝas ĉiam per la afero proklami la leĝon; irante, starante, aŭ sidante, neniam mi laciĝas de l' afero.
24. Mi refreŝigas la tutan mondon, kiel la nubo kiu verŝas la akvon sendiference. Mi havas egalan senton, por la honoraj kaj malhonoraj, por la moralaj kaj malmoralaj,

---

<sup>11</sup> jina

<sup>12</sup> tridhātu: kāmādhātu (mondo de deziro, 欲界), rūpadhātu (mondo de koloro, t.e. materio, 色界), ārūpyadhātu (nekolora mondo, t.e. nematerio, 無色界)

25. Por la ĝentilaj kaj malĝentilaj, por tiuj kiuj havas ĝustan opinion, kaj tiuj kiuj havas malbonan opinion,
26. Pro la kleraj kaj malkleraj; mi predikas la leĝon al ĉiuj; siatempe mi disdonas pluvon de leĝo, kaj neniam laciĝas.
27. Aŭdinte de mi, ĉiu laŭ sia kapablo, trovas sian propran lokon en diversaj pozicitoj, inter dioj, homoj, inter Manorathoj<sup>13</sup>, inter Indroj<sup>14</sup>, Braĥmanoj<sup>15</sup>, ĉefoj, regatoj de l' universo.
28. Aŭskultu, do, mi klarigos al vi kion signifas la vegetaĵoj en malsamaj kreskadoj; el ili, iuj estas malgrandaj, iuj mezgrandaj, kaj la aliaj grandaj.
29. Malgrandaj medikamentherboj estas tiuj kiuj jam Nirvanon atinginte, iradas en la scio de l' leĝo, kiu liberigas nin el la pasioj, kaj posedas la ses transcendantajn povojn<sup>16</sup> kaj la tri sciojn<sup>17</sup>.
30. Mezgrandaj medikamentherboj estas tiuj, kiuj, loĝante solaj en la arbaro, ĉiam faras meditadojn<sup>18</sup>, kaj ricevis la konscion de Pratyekabudho.
31. Grandaj medikamentherboj estas tiuj, kiuj sopiras al la pozicio de la Sinjorego de l' mondo, kaj dirante, "Mi devas fariĝi Budho, ĉefo de dioj kaj homoj", faras meditadojn en asketismo.
32. Cetere, la idoj de Sugato, kiuj diligente praktikadas kompatemon kaj pacigaĵon, kaj estas certaj pri sia atingado de Budheco, estas nomataj malgrandaj arboj.
33. Tiuj, kiuj antaŭenrulas la radon de l' leĝo neniam returnenturniĝontan, kaj firmege restante ĉe l' praktikado de miraklopovo, savadas dekmilionojn da vivantoj, estas nomataj grandaj arboj.
34. Sed tio estas la sama leĝo, kion predikas la venkinto, kiel la nuboj elverŝas la saman akvon; malsamaj estas nur la kapabloj, kiel la vegetaĵoj sur la tero.
35. Per tiu ĉi parabolo, vi komprenos la lertecon de l' Tathagato, kiel li predikadas la saman leĝon, kies diversaj disvolviĝoj estas komparotaj al gutoj de pluvo.
36. Mi ankaŭ elverŝas pluvon, pluvon de leĝo, dank' al kiu, la tuta mondo estas revivigota; kaj ĉiu laŭ siakapablo, prenas en la koron la bonegan leĝon, kies esenco estas unu sama.
37. Kiel la herboj malgrandaj, mezgrandaj, kaj grandaj, kaj la arboj malgrandaj

<sup>13</sup> La ĉina tradukinto ientigas ĝin kun Ĉakravatirâgâ 轉輪聖王 (rado-turnanta reĝo)

<sup>14</sup> 帝釈

<sup>15</sup> 梵天

<sup>16</sup> abhijñā: 1. povo fari miraklon, 2. povo vidi ĉion, 3. povo aŭdi ĉion; 4. povo vidi en la spiriton de aliuloj; 5. povo scii la pasintan (antaŭnaskan) vivon; 6. povo scii estingiĝon de l' pasioj. 六神通

[Tiu ĉi komentario ne estas ĝusta. La unua devas esti povo kuri libere kaj aperi ĉie ajn laŭ sia volo. - de Yamaguti S.]

<sup>17</sup> sama kun la 5a, 2a kaj 6a de l' abhijñā. 三明

<sup>18</sup> dhyāna. 禪定

- kaj grandaj, fariĝas freŝaj kiam pluvos.
38. Tiel same, la tuta mondo estas prosperigota de l' leĝo; per la leĝo la tuta mondo refreŝiĝas; kaj kiel la vegetaĵoj ekfloras, tiel same faras la mondo refreŝigata.
  39. La medikamentherboj kiuj restas en la mezgranda kresko, estas la Ŝravakoj<sup>19</sup>, kiuj haltas ĉe l' venko de la pasio, kaj la Pratjekabudhoj<sup>20</sup>, kiuj loĝante en arbaro, plenumas la leĝon.
  40. Bodhisatvoj, kiuj prudentaj kaj saĝaj iradas super la tri mondoj, sopirante al la plej alta vekigeo, estas komparotaj al la malgrandaj arboj, kiuj daŭrigas kreskadon.
  41. Kaj tiuj, kiuj jam akirintaj la transcendan povon, kaj spertecon en la kvar gradoj de l' kvietita meditado<sup>21</sup>, kore ĝojegas aŭdinte la doktrinon de Vakuismo, kaj dissendas sennombrajn radiojn de lumo, - tiuj estas nomataj la granda arbo.
  42. Tiele, ho Kaŝjapa, la leĝo, predikata de l' Tathagato, similas al la akvo, elverŝata de l' nuboj, ĉie sendiference, per kiu medikamentherboj kaj homoj prosperas, kaj senfine floradas.
  43. Mi instruas, ho Kaŝjapa, la leĝon per diversaj paraboloj pri la kaŭzoj, kaj siatempe elmontras la vekigecon de Budho; tio estas lerteco de mi kaj ankaŭ de ĉiuj Sinjoregoj.
  44. Kion mi nun diras al vi, tio estas la plej vera afero; ĉiuj miaj disĉiploj atingos la Nirvanon; per sekvado al la plej alta vojo de vekigeo, vi ĉiuj devas fariĝi Budhoj.

Kaj plue, ho Kaŝjapa, la Tathagato, en edukado de la vivantoj, estas egalanima kaj ne personfavora. Kiel la lumo de la suno kaj la luno, ho Kaŝjapa, sin ĵetas sur la tutan mondon, - sur la virtulon kaj la malvirtulon, sur la spertulon kaj la malsupertulon, sur la bonodoranton kaj la malbonodoranton, tute egale, sen personfavoro; tiel same, ho Kaŝjapa, la intelekta lumo de l' scio de l' Ĉioscianto, la Tathagato-Arhat-Plenvekiĝinto, - la predikado de l' vera leĝo disvastiĝas egale sur ĉiuj vivantoj en la kvin vagejoj<sup>22</sup>, kiuj laŭ siaj ecoj okupiĝas, aŭ en la granda veturilo aŭ en la veturilo de Pratjekabudhoj aŭ en la veturilo de Ŝravakoj.

Kaj en la lumo de l' Tathagata scio, por plene komprenigi la leĝon al ĉiu, estas nek tromulto nek tromalmulto. Ne ekzistas, ho Kaŝjapa, tri veturiloj; sed pro tio, ke vivantoj agadas malsame, starigitaj estas la tri veturiloj.

---

<sup>19</sup> aŭdantoj, aŭ disĉiploj, kiuj liberiĝis, aŭdinte la voĉon de Budho rekte. 声聞

<sup>20</sup> kiu vekigeo aŭ liverigeo per si mem. 緣覺

<sup>21</sup> catvāri dhyāna. 四禪: la unuagrada kvietita bmeditado, la duagrada, la triagrada, kaj la kvaragrada.

<sup>22</sup> pañca gatayah. 五趣: la kvin statoj de ekzistado, tra kiuj la vivantoj vage rondiradas en la metempsikoza vivo: vagejo de infero; vagejo de malsataj demonoj; vagejo de bestoj; vagejo de homoj; vagejo de dioj.

Kiam la Sinjorego tiel parolis, tiam diris la honora Granda Kaŝjapa al la Sinjorego: Sinjorego, se ne estas tri veturiloj, do, pro kio, je l' unua tempo, estas la nomoj: Ŝravako, Pratyekabudho kaj Bodhisatvo?

Por tiu demando, responde diris la Sinjorego al la honora Granda Kaŝjapa kiel jene: -

Tio similas, ho Kaŝjapa, al ceramikisto, kiu fabrikas diversajn vazojn el la sama argilo. El la vazoj, iu estas sukero, iu butero, iu lakto, iu kremujo, kaj la alia estas malpurigilo. Rilate al la argilo, estas neniam malsameco; nur pro diverseco de l' aĵoj entenataj, vazoj havas diversajn nomojn. Tiel same, ho Kaŝjapa, estas nur unu veturilo, t.e. la granda veturilo. Ne estas dua veturilo, nek la tria.

Kiam la Sinjorego tiel parolis, tiam diris la honora Granda Kaŝjapa al la Sinjorego: Sinjorego, se la vivantoj havas diversajn ecojn, tiam ĉu estas unu Nirvano aŭ du, aŭ tri, por tiuj, kiuj eliris el la tri mondoj?

Respondis la Sinjorego: Nirvano, ho Kaŝjapa, rezultas de tio, ke oni komprenas ke ĉiuj leĝoj estas egalaj. Pro tio, estas nur unu Nirvano, ne du, nek tri. Tial, ho Kaŝjapa, mi faros por vi parabolon; ĉar inteligentuloj bone komprenos la signifon de tio kio estas instruata per parabolo.

Tio similas, ho Kaŝjapa, al denaska blindulo, kiu diras: Ne ekzistas koloroj belaj kaj malbelaj, nek homoj, kiuj povas vidi kolorojn belajn aŭ malbelajn; ne ekzistas suno nek luno; ne ekzistas steloj nek planedoj; nek homoj, kiuj povas vidi planedojn. Sed aliaj homoj diras al la denaska blindulo: Ekzistas koloroj, belaj kaj malbelaj; ekzistas homoj, kiuj povas vidi kolorajn belajn kaj malbelajn; ekzistas suno kaj luno, steloj kaj planedoj, kaj homoj, kiuj povas vidi planedojn. Sed la denaska blindulo ne kredas, nek akceptas tion, kion ili diras. Estas bona kuracisto, kiu konas ĉiujn malsanojn. Vidante la denaskan blindulon, li diras al si: Certe tiu viro pekadis en sia antaŭnaska vivado, kaj pro tio li ricevis la malsanon. En ĉiuj malsanoj, estas kvar specoj, t.e. venta, gala, flegmona, kaj kaŭzita de komplikiĝo de l' fluidaĵoj (en la korpo). La kuracisto ripete pensadas pri rimedo por kuraci la malsanon, kaj diras al si: Certe per la ordinaraĵoj, oni ne povas kuraci ĉi tiun malsanon; sed en Himalajo, reĝo de montoj, troviĝas kvar medikamentoj; el ĉi tiuj, la unua estas nomata: Posedanta-Ĉiujn-Kolorojn-kaj Gustojn; la dua: Liberiganta-el-Ĉiuj-Malsanojn; la tria: Fetruonta-Ĉiujn-Venenojn; la kvara: Donanta-Feliĉon-al-Ĉiuj-Kieajn-Ili-Sintrovas.

La kuracisto atingas Himalajon, la reĝon de l' montoj, per la rimedo, kiun li elpensis pro kompato por la denaska blindulo. Tie li supreniras, malsupreniras, flankeniras por serĉadi; kaj tiamaniere serĉante, li trovas la kvar medikamentojn. El ili iun li maĉas per dentoj, kaj donas; iun li pistas, kaj donas; iun li bolas kune kun alia drogo, kaj donas; iun li miksas al alia kruda drogo kaj donas; iun li donas ekpikante la korpon per pikilo; iun li donas bruligante ĝin per fajro; iun li donas miksan ĝin al alia substanco, aŭ al la manĝaĵo. Dank' al la aplikado de l' rimedoj, la denaska blindulo ricevas vidpovon. Ricevinte la vidpovon, li vidas eksteren kaj internen, malproksimen kaj proksimen, la lumon de l' suno kaj la luno, la stelojn, la planedojn kaj ĉiujn fenomenojn, kaj diras: "Kiel mi estis malsaĝa, ne kredinte nek

akceptinte tion, kion oni diris! Nun mi vidas ĉion; mi jam liberiĝis de la blindeco, kaj ricevis vidpovon. Min superas ja neniu." Tiam saĝuloj posedantaj la kvin transcendajn povojn - dia okulo, dia orelo, povo travidi menson de aliuloj, memoro de antaŭnaska ekzistado, kaj povo fari miraklon - diras al la viro kiel jene: "Viro, vi ĵus ricevis nur la vidpovon, kaj ankoraŭ scias nenion. Pro kio do tiel fanfaroni? Vi havas nenan saĝon, nek vi estas inteligentulo." Kaj pluen ili diras al li: "Viro, kiam vi estas en la ĉambro, vi ne povas vidi, nek scias tion, kio okazas ekstere; vi ne distingas ĉu vivantoj havas bonan koron aŭ malbonan koron; vi ne povas aŭdi homan voĉon aŭ sonon de tamburo, konktrumpeto kaj la similaj, ĉe l' distanco de kvin joĝanoj<sup>23</sup>; eĉ al la loko de unu kroŝo<sup>24</sup>, vi ne povas iri alie ol levi viajn piedojn; kreskinte en la utero de patrino, vi memoras nenion pri la fakto; kiel do vi estus inteligenta, kaj pro kio vi povas diri: Mi vidas ĉion! Viro, vi prenas lumon por mallumo, kaj mallumon por lumo!"

Tiam la viro demandas al la saĝuloj: "Per kia rimedo, per kia bona agado, mi povos ricevi tian saĝon, kaj, dank' al via favoro, ricevi tian virton?" La saĝuloj diras al li: "Se vi tion deziras, vi devas loĝi en la dezerto, aŭ sidi en la montkaverno, por meditati pri la leĝo, kaj forigi la malbonajn pasiojn. Tiamaniere vi proprigos al vi la asketan virton, kaj ricevos la transcendajn povojn." La viro komprenas la signifon, fariĝas asketo, loĝas en la dezerto, koncentrigas la penson sur unu afero, forĵetas la mondumajn dezirojn, kaj ricevas la kvin transcendajn povojn. Ricevinte la transcendajn povojn, li pensas: Antaŭe mi faris alian aferon kaj pro tio neniu merito rezultis al mi. Nuntempe, tamen, mi povas iri kien ajn mi volas; antaŭe mi estis malgrandsaĝa, malgrandkomprena, vere blinda.

Tiamaniere, ho Kaŝjapa, por ke vi komprenu la signifon, mi faris ĉi tiun parabolon; kaj jen estas la signifo. La denaska blindulo, ho Kaŝjapa, estas nomo al la vivantoj, kiuj daŭrigas rondiradon en la ses vagejoj<sup>25</sup>.

Ili ne scias la veran leĝon, kaj pliigas mallumon de l' malbonaj pasioj. Ili estas blindaj pro senscio; blindaj pro senscio, kaj sekve ili amasigas la faraĵojn<sup>26</sup>; sekve de la faraĵoj, la "nomoj-kaj-formo<sup>27</sup>", kaj tiel pluen, ĝis kreiĝo de amasego da suferaĵoj.

Tiel la vivantoj, blindaj pro senscio, daŭrigas rondiradon; sed la Tathagato, kiu estas ekster la tri mondoj, sentas kompaton por ili, kvazaŭ patro por sia amata filo,

---

<sup>23</sup> yojana 由旬. Unuo de sistanto-mezuro, egala al 20-40ĉinaj liroj.

<sup>24</sup> kroŝa 俱盧舍. 1/8 joĝano; maksimuma distanco, ĝis kie sono de tamburo aŭ bleko de bovo aŭdiĝas.

<sup>25</sup> 六處 = la kvin vagejoj + asuragati (vagejo de asuroj 修羅趣)

<sup>26</sup> saṃskāra 行業

<sup>27</sup> nāma-rūpa 名色: sama kun tiel nomataj "kvin amasaĵoj" (pañca- skandha 五蘊), t.e. 1e formo a"materio; 2e sento; 3e ideo; 4e faro aŭ volo; 5e konscio. El ĉi tiuj de la 2a ĝis la 5a estas nomataj la "nomoj". La nomoj-kaj-formoj vualante la veran leĝon, nin malhelpadas atingi la Nirvanon.

kaj aperas en la tri mondoj, kaj tie vidas kun sia okulo de saĝo la vivantojn, kiuj vage rondiradas kaj ne scias kiel sin savi de la rondirado. Vidinte ilin, li konkludas: Tiuj vivantoj, laŭ siaj bonfaroj antaŭnaskaj, havas aŭ malfortan koleremon kun forta avidemo, aŭ fortan koleremon kun malforta avidemo; iuj estas malgrandsaĝaj, la aliaj inteligentaj; iuj havas kulturitan puran opinion, la aliaj malbonan opinion. Pro taktiko, la Tathagato montras al ili la tri veturilojn.

La saĝuloj kun kvin transcendaĵoj povoj kaj ĝusta okulo estas la Bodhisatvoj, kiuj pro vekiginta animo kaj obeemo al la eternaj leĝoj<sup>28</sup>, enlumiĝas en la plej altan plenan vekigecon.

La kuracisto estas la Tathagato. Al la denaska blindulo estas komparita la vivanto blinda pro senscio. Al la vento, la galo kaj la flegmono estas komparitaj la avidemo, la koleremo, la malsaĝo kaj la sesdek du malĝustaj opinioj. Al la kvar medikamentherboj estas komparitaj la doktrinoj de vakuismo senkarakterizo, foraspiro kaj la celado al la Nirvano. Kiel oni kuracas la malsanon per la diversaj drogoj, tiel same la vivanto povas forigi la senscion per disvolviĝo de l' ideo de vakuismo, senkarakterizo, foraspiro, principoj de liberiĝo. El forigo de senscio, rezultas forigo de faraĵo, kaj tiel pluen ĝis forigo de la amasego da suferaĵoj. Kaj tiel lia animo jam ne restas en la bono nek en la malbono.

Al la viro, nove ricevinta la vidpovon, estas komparita la adepto de l' veturiloj de Ŝravakoj aŭ Pratjekabudhoj. Li jam disrompis la katenon de l' malbonaj pasioj en la rondirado; sekve de l' liberiĝo el la katenado de l' malbonaj pasioj, li estas emancipita el la tri mondoj kaj la ses vagejoj. Pro tio la adepto de l' Ŝravaka veturilo pensas kaj diras: "Plu ekzistas ne iu leĝo, kiun mi devas ekkoni; mi jam atingis la Nirvanon." Tiam la Tathagato predikas al li dirante: "Kie estas la fina Nirvano al tiu, kiu anoraŭ ne konas ĉiujn leĝojn?" La Tathagato instruas al li la vekigecon; ricevinte la vekigecon, li plu ne restas en la rondirado, sed ankoraŭ ne atingas la Nirvanon. Li komprenas la tri mondojn en la dek direktoj, vakuaj, similaj al sorĉaĵo, similaj al iluzio, al sonĝo, miraĝo aŭ eĥo. Li vidas ĉiujn leĝojn, ne naskiĝintaj nek mortontaj, ne ligitaj nek malligitaj, ne mallumaj nek lumaj. Kiam li vidas la profundan leĝon tiamaniere, li vidas, kvazaŭ li vidas nenion, ke la tutaj tri mondoj estas plenaj de vivantoj kun diversaj, malsamaj emoj kaj ecoj.

Kaj tiam, por ekspliki la signifon pli klare, la Sinjorego donis jenajn versaĵojn: -

45. Kiel radioj de l' suno kaj la luno falas sur ĉiujn homojn, ĉe bonaj ĉu malbonaj, tute egale, ne pli multe nek malpli multe;
46. Tiel same la saĝlumo de l' Tathagato, simile al la radioj de l' suno kaj la luno, gvidas ĉiujn vivantojn kun neniu malegaleco.

---

<sup>28</sup> anupattika-dharma-kṣānti 無生法忍, aŭ laŭvorte: elportado de l' sennaskiĝa (t.e. ekzistanta de eterne) leĝo.

[Tiu ĉi komentario estas miskompreniga. "Nenaskiĝo" signifas nenian eternan enton. La ideo montras, ke ĉio ŝanĝiĝas, sed ne naskiĝas el nenio nek estingiĝas en nenion, aŭ ĉio senĉese ŝanĝas sian aspekton. - de Yamaguti S.]

47. Kiel ceramikistoj produktas, el la sama argilo, vazon por sukero, por lakto, por butero, por akvo;
48. Iun por malpuraĵo, alian por laktaĵo; sed la argilo uzata de l' fabrikanto estas unuspeca;
49. Kiel la vazo ricevas sian propran formon, laŭ la eco de la aĵo entenota, tiel same la Tathagato, laŭ la diverseco de l' gusto ĉe l' vivantoj.
50. Eksplikas diversecon de l' veturiloj, kvankam estas definitive ke nur la Budha veturilo ekzistas. Kiu pro senscio daŭrigas rondiradon, tiu ne konas la benatan ripozon.
51. Sed kiu komprenas ke ĉiuj leĝoj estas vakvaj kaj la memo ne reale ekzistas, tiu konas la vekiĝecon de ĉiuj Budhoj-Sinjoregoj en ĝia esenco.
52. Kiu okupas mezan lokon en la saĝo, tiuj nomiĝas Pratjekaĝino<sup>[tiel!]</sup>; al kiu mankas la scio de vakuco, tiu nomiĝas Ŝravako.
53. Kiu komprenas ĉiujn leĝojn, tiu nomiĝas Samjaksambudho; ĉi tiu, per centoj da artifiko, fervore instruadas la leĝon al vivantoj.
54. Tio similas al denaska blindulo, kiu pro tio, ke li ne vidas sunon, lunon, stelojn kaj planedojn, neas ekzistadon de ĉio, kio estas videbla.
55. Sed granda kuracisto, pro kompatato por la blindulo, iras al Himalajo, kaj supren, malsupren, flanken trairante,
56. Elserĉas el la monto kvar medikamentherbojn: De-ĉiuj-koloroj-gustoj-statoj kaj aliaj. Ĉi tiujn li intencas apliki.
57. Li aplikas ilin tiele; iun li maĉas per dentoj, kaj donas al la blindulo; la alian li pulvorigas; ankoraŭ la alian li enkondukas en la korpon de l' viro per la pinto de pikfero.
58. La viro ricevas vidpovon, vidas sunon, lunon, planedojn kaj stelojn, kaj konkludas ke tio estis pro senscio ĉe li, ke li diradis tiel, kiel antaŭe.
59. Tiel simile, vivantoj tute sensciaj, denaske blindaj, ĉiam daŭrigas vagiradon, ĉar ili ne scias la turniĝadon de kaŭzo kaj rezulto, nek la vojeton de suferado.
60. En la mondo tiel blinda pro senscio, aperas la plej supra el la ĉiosciantoj la Tathagato, granda kuracisto, kompatemulo.
61. Kiel lerta instruisto, li instruas la veran leĝon; al la plej progresema veturanto, li predikas la plej supran Budhan vekiĝecon.
62. Al tiuj, kiuj estas mezgradaj en saĝeco la gvidanto predikas la vekiĝecon de l' meza grado; al tiuj, kiuj timas la vagiradon, li ankaŭ rekomendas la alian vekiĝecon.
63. Ŝravako, kiu juĝas sin liberigita de la tri mondoj, diradas: Mi jam atingis la puran pacodonan Nirvanon.
64. Tiam al li mi diras: Tio ne estas la Nirvano; la eterna Nirvano estas atingota nur post kompreno de ĉiuj leĝoj.
65. La grandaj Saĝuloj pro kompatato diras al li: Vi sensaĝulo, ne fieru pro via scio.
66. Estante en la ĉambro, vi ne scias kio okazis ekstere; tiom vi estas malgrandsaĝa.
67. Estante interne, vi ne scias, eĉ nun, kion oni faras aŭ ne faras ekstere. Ĉu eble

- ke vi estu saĝa? Tiom vi estas malgrandsaĝa.
68. Vi ne povas aŭdi sonon ĉe l' distanco de kvin joĝanoj, mujlte malpli ĉe l' pli malproksima distanco.
  69. Vi ne povas distingi kiuj havas malbolnan intencon, aŭ kiuj havas bonan intencon por vi. Pro kio do vi povus fieri?
  70. Okaze ke vi volas iri unu kroŝon, vi ne povas iri se ne estas vojo. Kio okazis al vi dum vi estas en la utero de via patrino, tion vi tute forgesis.
  71. Tiu nomiĝas ĉioscianto, kiu havas la kvin transcendajn povojn. Vi malsaĝulo sciante nenion pretendas esti ĉioscianto.
  72. Se vi serĉas ĉioscion, kiu devenas de la transcendaj povoj, meditadu, loĝante en la dezerto, pri deveno de l' transcendaj povoj.
  73. La viro komprenas la signifon, iras al la dezerto, meditadas en trankvileco, kaj ricevinte la kvin transcendajn povojn, kompletigas al si la meriton.
  74. Tiel ĉiuj Ŝravakoj supozas kvazaŭ ili atingus la Nirvanon; sed la Ĝino [tiel! devus esti "venkinto"] instruas al ili: Tio estas ripozeto, sed ne estas la fina Nirvano.
  75. Predikado de tia doktrino estas artifika de l' Budhoj; sed kie ne estas ĉioscio, tie ne estas Nirvano; prenu por ĝin atingi.
  76. La senliman scion de l' mondo en tri tempoj, purajn farojn de l' ses perfetigoj<sup>29</sup>, vakuismon, senkarakterizon, forigon de aspiro;
  77. La ideon de vekiĝeco, ĉiujn leĝojn, kiuj alkondukas al la Nirvano, ĉu influitajn per, ĉu liberajn de la malbonaj pasioj, aŭ trankvilajn kvazaŭ vakua senlimaĵojn,
  78. La kvar agojn de l' purkoruloj<sup>30</sup>, kaj la kvar favorojn<sup>31</sup>, aprobitajn de l' eminentaj saĝuloj pro edukado de l' vivantoj;
  79. Kiuj scias ĉion ĉi supran, kaj tion, ke ĉiuj fenomenoj en sia esenco estas

---

<sup>29</sup> Ŝatpāramitā 六波羅蜜, 六度. La sed rimedoj, per kiuj oni sin kulturu por atingi la alian bordon de Nirvano trans "la maro de vivo kaj morto": 1e Dāna 布施, kio estas doni sian posedadon ĉu materian ĉu spiritan al aliuloj; 2e Śīla 持戒, kio stas bone observi la religiajn ordonojn; 3e Kṣānti 忍辱, kio estas elportadi ĉian doloron, ĉian suferon, ĉian ofendaĵon, k.c.; 4e Vīrya 精進, kio estas penado por sin kulturi; 5e Dhyāna 禪定, kio estas kvieta meditado; 6e Prajñā 智慧, kio estas forigi ĉiujn malbonajn opiniojn, kaj ricevi bonajn sciojn.

[La tradukinto miskomprenas, klarigante ke Śīla estas observado de religiaj ordonoj, ĉar en budhismo ne ekzistas "ordonoj" Śīla estas aŭtonomie sed ne heteronomie respektataj etikaj kodoj. - de Yamaguti S.]

<sup>30</sup> Brahmācāryā 梵行; praktikado de l' kvar virtoj. t.e. 1e bonfaremo; 2e kompatemo; 3e simpatio; 4e egalanimeco.

<sup>31</sup> catvāri saṃgraha 四攝法; la favoraj manieroj, per kiuj la bodhisatvo traktas vivantojn, nome: 1e Dāna, t.e. donadi siajn posedaĵojn; 2e Priyavādītā, t.e. paroli kun afableco; 3e Arthacāryā, t.e. agadi pro utilo de aliuloj; 4e Samānārthatā, t.e. sin okupi per komuna celo, 布施; 愛語; 利行; 同事.

- iljuziaj, songaj, senkernaj kvazaŭ pizanga trunko, aŭ similaj je l' eĥo;
80. Kiuj scias tion, ke la tri mondoj entute estas tia en sia esenco, tiuj ja scias la Nirvanon, ne ligitan nek malligitan.
  81. Kiuj konsideras ĉiujn leĝojn, egalaj, vakuaj, senproprecaj, senindividuecaj, ne devenintaj de inteligenta kaŭzo, - unuvorte kiuj vidas neniun leĝon,
  82. Tiuj solaj estas saĝeguloj, kaj vidas la tutaĵon de l' leĝo. Verdire ne estas tri veturiloj, sed ekzistas ĉi tie nur unu veturilo.
  83. Ĉiuj leĝoj estas egalaj, - egalaj por ĉiuj, kaj egalaj por ĉiam. Kiu scias ĉi tion, tiu povas kompreni la pacodonan Nirvanon.